

Basyoo

## Streta vojo al fora interno

(Tradukis en Esperanton Teruhiro Sasaki)

Monatoj kaj tagoj estas pasantaj gastoj por eterne, dum multaj generacioj, kaj irantaj-venantaj jaroj ankaŭ estas vojaĝantoj. Kiuj maljuniĝas, fluante sur ŝipoj tra la tuta vivo, kondukante ĉevalojn je iliaj enbuŝaĵoj, tiuj ĉiujn tagojn vojaĝas, kaj la vojo estas sia loĝejo. Antikvuloj ankaŭ mortis multe dum la vojaĝo.

Mi ankaŭ, de kiam mi ne scias, allogate kiel numero ŝvebanta per vento, sopiradis senĉese al vagabondado kaj vagadis laŭ marbordo. Do pasintjare (lastjare) en aŭtuno mi, tuj reveninte el vojaĝo, puriginte malnovan araneaĵon en mia domaĉo ĉe la rivero, mi jam ekdeziris baldaŭ ĉirkaŭ la fino de la jaro ke mi nepre veturu trans la nordan barieron de Sirakawa, la pordon al norda provinco en la komenco de printempo sub la ĉielo kun strio(zono) da nubeto. Mian koron obsedis kaj frenezigis la vagabonda demono, kaj plie eĉ la gardanto-dio(gardangelo) de vojaĝo alvokis min al vojo, do mi abrupte kaj rapide pretiĝis vojaĝon, kudrante truojn de pantalono, renovigante ŝnurojn de ombrelo-ĉapelo. Jam kaŭterizante al mi krurojn, mi sopiris antaŭ ĉio la lunon sur Matusima, la pitoreska norda golfo. Loĝejon doninte al aliulo, mi transiris al la vilao de Sanpuu, mia lernanto, tiam do mi metis sur la pilastro de antaŭa ermitejo paperon kun ok versoj, unu el kiuj estas sekva.

Humila ermetejo kun herba pordeto,

Al loĝantoj tempas ŝanĝi,

Fariĝos domo kun pupfesto.

(En la dometo, forlasita de humila ermito, nun ekloĝos feliĉa familio, kiu dekoracias pupetojn por filinoj.)

[Kusa no to mo sumi kawaru yo zo hina no ie]

En la fina tago de tria monato, la dudek sepa, mi ekiras, kiam aŭrora ĉielo elkrepuskiĝas, la luno perdas sian brilon en la matena lumo, la pinto de la monto Huzi estas apenaŭ videbla. Mi sentas min trista, pensante kiam mi denove povos vidi branĉojn de ĉerizfloroj sur la monteto Ueno kaj Yanaka. Korproksimaj kolektiĝis ekde antaŭa vespero, kaj akompanis min kune enŝipiĝinte.

Mi elŝipiĝis ĉe la loko Senzyu, mi verŝis larmojn de disiĝo sur la efemera mondo, kiam mia koro pleniĝis de la penso pri 3000 leŭgoj (ĉ. 12000 km) de vojo kuŝanta antaŭ mi.

Trapasas printempo,  
Krias birdoj,  
Larmoj en la okuloj ĉe fiŝoj.

[Yuku haru ya tori naki, uo-no me wa namida]

Per ĉi tiu verso komencis mia vojaĝlibro, sed mia paŝo ne tuj iras. Karaj homoj, starante vice sur la vojo, volis forvidi min probable dum mia dorso videblas.

Ĉi-jare, en la dua jaro de Genroku epoko (1689 p. K.), mi nur senprudente ekpensis longan vojaĝon al Oou (la malproksima norda provinco), spite al maljunuleco por la longa vojo, sed pri tiu loko mi nur aŭdis kaj ankoraŭ ne vidis per propraj okuloj, do mi hazarde esperis al ambigua fortune, vetante je sorto, ke estus bone, se mi revenus viva, kaj en la tiu ĉi tago mi atingis la etapan urbon, nomatan Sooka. Antaŭ ĉio mi suferas de la aĵo sur mia malgrasa ŝultro. Mi volus ekiri, havante nenion krom mi mem, sed mi ne povis forĵeti tiujn aĵojn, kiel unu veston el papero por nokto, leĝeran kimono, pluvveston, tuĉon kaj tuĉpenikon, k. s., kaj adiaŭajn donacojn, kiujn mi ne povis rifuzi. Tiuj aĵoj neeviteble fariĝis la ĝena ŝarĝo por la vojo.

Mi vizitis la sanktejon, nomatan Muro-no-Yasima. Mia akompananto, Sora, diris al mi: “Ĉi tiu Diino nomiĝas Konohanasakuyahime (t.e., princino de arbofloro), la sama kiel Diino de la monto Huzi. Ŝi bruligis sin en senfenestra ĉambro por pruvi sian senkulpecon, ĵurante sian ĉastecon, kaj kie ĵus tiam naskiĝis la diido, nomata Hohodemi, t. e. dio el fajro. Tial oni nomis ĝin Muro-no-Yasima, t. e. sanktejo de ĉambro. Do laŭ la legendo, en niaj poemoj la sanktejo estas kutime asociata kun fumo”.

Ĉi tie ankaŭ estas malpermesite manĝi fiŝon Konosiro (haringo, klupeo). En la mondo estas transdonita tia speco de superstiĉo=aŭguro kaj legendo de generacio al generacio.

La 30-an (19 de majo), ni tranoktis ĉe la piedo de la Monto de Nikkoo. La gastejestro diris:

“Mi nomiĝas Budho=Gozaemon, ĉar principe mi penas esti honesta, tial oni nomas min tia, do bonvolu ripozi trankvile (kiel hejme) eĉ unu nokton en la vojo”.

Mi atente rigardas lin kion li faros por helpo al la almozulo=pilgrimulo, samekiel Budho, aperinta en la malpura polvoplana mondo, tamen li nur montriĝas malsaĝa, senprudenta, honesta obstinulo. La vasta simpla animeco egalas al la alta virto, kiel dirite de Konfuceo, oni devas estimi denaskan puran karakteron.

La unuan de aprilo [20 de majo] ni adorvizitis la sanktan monton. Antikve oni ĉi tiun

monton nomis Hutarasan [t. e. la monto de du dezertoj], tamen kiam Granda ĉefbonzo Kuukai establis templon, la monto ŝanĝis nomon per Nikko [t. e. sunlumo]. Kuukai antaŭvidis futuron tra multaj jaroj, nuntempe ĉi tiu lumo brilas en tuta ĉielo, ĉiuflanden pleniĝas la favoro, popoloj de kvar tavoloj[samurajoj, kamparanoj, metiistoj, komercistoj] vivas pace kaj trankvile. Ju pli granda estas la gloro, malpli mi povas skribi plu pro respekto.

Kiel kara!  
Tra verdaj folioj, tra junaj folioj  
Lumo de suno  
[Ara tahuto aoba wakaba no hi no hikari]

La monto Kurokami [t. e. monto de nigraj haroj], alie la ĉefa monto de Nikko, kun nebuleto, kaj sur la pinto la neĝo ankoraŭ restas blanka. S-ro Sora versis sekve:

Forrazis tute,  
Anstataŭ nigraj haroj,  
Alie vestiĝis en nigra vesto  
Kiel la Monto Kurokami. Sora  
[Sori sutete kuro kami yama ni koromo gae]

S-ro Sora devenas de la familio Kawai, nomiĝis Soogorou. Li helpis al mi hejman mastrumadon, loĝante najbare al mia ermito ĉe Bananaj subfolioj. Ĉi-foje li kun ĝojo akompanis min vidi kunkune pejzaĝon en Matusima kaj Kisagata, kaj li volis malpezigi malfacilaĝon en la vojaĝo, je la ekiro li forrazis kapharojn, metamorfozis sin en la nigra bonza vesto, ŝanĝis eĉ nomon el Soogoroo al Soogo [t. e. klereco], [al la budhisteska nomo]. Tial estas kreita la verso pri la monto de nigraj haroj. Du vortoj, “Alie vestiĝis”, sonas forte.

Kiam ni supreniris 20 ĉoo (t. e. 2 km) kaj kelkaj, troviĝas la akvofalo. El la pinto de roko ĝi falas en la verdan basenon ĉirkauata de mil rokoj je 100 ŝakvoj (t. e. 30 metroj). Oni nomas ĝin “akvofalo videbla el malantaŭo”, ĉar oni vidas la kaskadon, enirante en la kavernon malantaŭ la akvofalo.

Iom da tempo  
Enklostoriĝis mi en kaskado,  
La komenco de somero

[Sibaraku wa, taki ni komoru ya, ge no hazime]

En provinco Nasu, en la loko, nomata Kurobane [nigra plumo], loĝas miaj konatoj, tial nun ni prenis rektan malproksiman vojon, trairante la sovaĝan kampon. Tre malproksime videblas unu vilaĝo, do ni iras tien, tiam ekpluvas kaj vesperiĝas. Ni, petante kamparanon, tranoktis en lia kabano, kaj post la tagiĝo denove iris kampon. Ni trovis ĉevalojn, paŝtiĝantaj sub libera ĉielo. Ni ĝene alvenis al la homo, falĉanta herbon, li, kvankam kampulo, ja ne estas senkompatema. Li diris.

“Kiel fari? Sed tiu ĉi kampo estas disdividitaj en diversaj direktoj, mi dubas, ĉu novaj vojaĝantoj kiel vi povus perdi sian vojon. Tial bonvole vi uzu ĉi tiun ĉevalon ĝis la loko, kie la ĉevalo haltiĝos, kaj tiam lasu ĝin reveni mem”.

Kaj li pruntedonis al ni sian ĉevalon. Du malgrandaj infanoj kuras sopirante post la ĉevalon. Unu estas knabineto, kiu nomiĝas Kasane. Ne kutima nomo sonas amema, Sora versis sekvan.

“Kasane”

devas esti la nomo

de multepetala floro “dianto”.

[Kasane to wa Yaenadesiko no na naru besi]

Baldaŭ ni atingis vilaĝeton, do redonis ĉevalon, liginte la monon al ĝia selo.

Ni vizitis s-ron Zyooboozi, kastelintendanton de Kurobane. Tiu mastro tre ĝojas neatendite, daŭris paroladi tage kaj nokte. Lia frato, nomata Tousui [Verda persikol], servadis nin matene kaj vespere, akompanis nin al sia domo. Ni estas invitita eĉ de lia parencoj. Tempo pasis tiel, ke ni promenis ekster la urbo kaj vidis la lokon de Inuoumono [ĉasado kun hundoj de rajdantoj sur ĉevaloj per pafarkoj], iris laŭ la kampo de Nasu, kaj vizitis la malnovan tombon de feovulpino Tamamo [vulpino kun oraj haroj kaj naŭ vosto, unue ĝi estis diino en Hindujo kaj fariĝis edzino de la reĝo en Ĉina Tang dinastio, poste venis al Japanio kaj fariĝis amata de la eksmikado Toba, ĝi estis mortigita en Nasu kaj ŝanĝiĝis en la mortiga ŝtono]. Post tio ni adorvizitis la sanktejon Hatimanguu. La fama pafarkisto Nasu Yoiti, celante al ventumilo, faris preĝon al ĉi tiu dio, dirante, “Mi aparte petas al la dio Hatiman de mia hejmloko”. Aŭdinte tion, des pli mi sentis forte impresita. Krepuskiĝis kaj mi revenis al la domo de s-ro Tousui. Apude estas la templo Komyoozi por ŝugendo [montkulta religio sinkretisma kun budhismo].

Oni invitis min tien, kaj mi adoris la kapeleton de la fondinto de ŝugendo [tie estas prokultata la montgrimpada getao(japana lignoŝuo) ].

Somera monto,

Adoris getaojn,

Je la ekvojaĝo

[Natu yama ni asida o ogamu kadode kana]

Profunde malantaŭ la templo Unganzi en ĉi tiu lando restis ruino de monta ermitejo de mia mentoro de Zen, bonzo Buttyoo.

Herba ermitejo

kun malpli ol la kvadrato de 150 cm.

Se ne pluvus, mi ne konstruus,

Al mi ja estas ĉagrene fari eĉ tion.

[Tate yoko no go syaku ni taranu kusa no io, musubu mo kuyasi ame nakari seba]

Mi iam aŭdis de li mem ke tiel li skribis sur la roko kun karbo de pino. Mi volas vidi tiun lokon kaj piediris al la templo, apogante je bastono. Oni propravole akompanas min, multaj junuloj gajas laŭ la vojo, do, ni atingis montpiedon dum mi ne scias. La monto montriĝas profunda, pado laŭ valo daŭras tre longa, arboj de pino kaj kriptomerio svarmiĝas nigre, musko estas malseka, vetero en la kvara monato estas ankoraŭ malvarma. Tra dek pitoreskaj lokoj laŭ la vojo, transirinte ponteton, eniras pordon de la templo. Do, kie troviĝas la ruino? Mi grimpas sur la malantaŭan monton, vidas, la eta ermitejo sur ŝtono staras ĉe la roko. Ŝajnas al mi ke mi vidus la ŝtonan ĉambron kun devizo "bariero de morto" de ĉina zenmajstro Mjoozenĝi Hooun[1238-1295], kiu daŭris sidi kun decido por ne eliri viva de tie.

Eĉ pigoj

Ne difektas ermitejon

En somera arbareto

[Kitutuki mo io wa yaburazu natu kodati]

Mi almetis improvizite ĉi tiun version al la fosto.

Post tio ni ekiris al la Mortiganta ŝtono, Sessyooseki. La kastelintendanto sendis nin per ĉevaloj. La grumo de mia ĉevalo petis min, dirante “Bonvole donu al mi vian verskartonon!”. Mi skribis por li, pensante, kian delikatan senton li havas.

Lasu kampon irantajn  
ĉevalojn dume turni al ci ,  
Ho, kukolo!

[No o joko ni uma hiki muke jo hototogisu]

La Mortiganta ŝtono troviĝas, kaŝate per monto, kie ekfluas varma fonto. Veneneco de la ŝtono ankoraŭ ne malaperis, tial abeloj, papilioj k.s. mortiĝis, kuŝante unu sur alia tiel, ke ne videblas la koloro de sablo.

Kaj la saliko Yugyouyanagi, kantita de la virtuoza Saigyoo [“Mi haltis iom da tempo ĉe la saliko, sub kiu fluas pura akvo laŭ vojeto”], restas en la vilaĝo Asino sur kamporado de rizejo. Lia moŝto Kohou, guberniestro de ĉi loko, ofte diradis, ke mi vidu ĉi tiun salikon. Do mi pensis, kie ĝi estas. Hodiaŭ mi staris finfine sub la saliko.

Unu rizkampon  
Plantinte,  
Foriras la saliko.

[Ta iti mai ue te tati saru yanagi kana]

(Saliko signifas poeton kaj poemon. Pejzaĝo kun pura rivereto nun ŝanĝiĝis en unu rizkampo, kvazaŭ rizon plantus la saliko. Pejzaĝo kaj poetoj foriras. Kaj mi ankaŭ.)

La tagoj pasis dum mi ankoraŭ ne konvinkiĝis, sed mia decido fiksis, trapasante la pordo-barieron Sirakawa, la eniron al la Nordo. Estas nature, ke unu antikvulo volis “kiel ajn sendi leteron al ĉefurbo” dum la trapaso. Ĉi tiu estas unu el tri famaj pordoj en la Nordo, kaj kiu havas poetan fajnecon por senti venton, tiu povas esti kortuŝata de ĉi tie. Sub la impreso de antikvaj poemoj restus en oreloj aŭtuna vento kaj videblus ruĝaj, karmezinaj folioj, kiam nun tamen mi vidas nur branĉojn kun verdaj folioj, ju pli grandiĝas imagoj, des pli beliĝas la pejzaĝo ĉirkaŭ la pordo. Floras ege blankaj deŭzioj kaj kune kun sovaĝaj rozoj, do ŝajnas al mi, ke mi trapasus ĉi pordon kvazaŭ tiam, kiam neĝus. Per plumo de Huziwara Kiyosuke[1104-1177], [la fakulo pri poetiko,] estas enskribita, ke, trairante la pordon, antikvuloj vestis sin belaj kaj pravigis ĉapon. Sora verkis tiele.

Per deŭzio kapornamite,  
la pordbarieron trairas  
kun ceremonia vestado.

[Unohana wo kazasi ni seki no haregi kana]

Tiele trapasinte, ni transiris riveron Oukuma. Maldeksre alte staras la monto Aizune[Bandai], dekstre videblas vilaĝoj Iwaki, Souma, Miharu, ĉenas montoj, kiuj estas la limo inter regionoj Hitati kaj Simotuke. Ni iras laŭ la lago, nomata Kagenuma, ŝpegula lago, sed hodiaŭ ombras ĉielo, tial ne bone reflektas.

Ni vizitis ĉe la stacio Sukagawa unu hajkiston, s-ron Toukyuu[1638-1715], kiu lasis nin resti ĉe si dum kvar-kvin tagoj. Antaŭ ĉio li demandis min, “Kiel vi trapasis pordobarieron Sirakawa?” [tio signifas, kiun poezion vi versis] Mi diris al li: “Ĝenante pro la longa vojaĝo, laciĝinte je korpo kaj spirito, aŭ elravite de pejzaĝo, rememorante korŝire malnovajn poetojn, mi ne povis sufiĉe elpensi propran verkon. Estas domaĝe, se nenion mi farus, do mi versis tiele.

Poezia komenco,  
de la nordo  
la ĥoro por rizpriklado

[Huuryyu no hazime ya oku no taue uta]

Tiam al tiu la aliaj alligis sian verson, duan kaj trian, kaj kompletiĝis triopo de verkoj.

Apud la staciurbeto loĝas unu bonzo sub granda kaŝtanarbo, forlasinte mondon. Ŝajnas, ke tia estis la sceno, versita de Saigyō pri profunda monto, kie li prenis hipokaŝtanajn glanojn. Mi priskribis en la papero tiele.

“Ideogramo de kaŝtano konsistas el la ideogramoj okcidento kaj arbo, tial havas rilaton kun la okcidenta pura lando, do onidire, eĉ Sankta Gyōki [668-749] uzas tiun arbon por bastono kaj por fosto”.

Al homoj en la ordinala mondo  
ne rimarkeblas tiaj floroj,  
kiel kaŝtanaj ĉe alero

[Yo no hito no mitukenu hana ya noki no kuri]

Irinte ĉirkaŭ 5 leŭgoj[20 km] for de la domo de s-ro Toukyuu, kaj trapasinte la etapon Hihada, ni trovis la monteton Asakayama, starantan proksime de la ĉefvojo. Ĉi tie estas

multe da marĉoj. Jam tempos falĉi herbon, nome Katumi [Zizania latifolia], do mi demandis al homoj, kiu herbo nomiĝas la flora katumi en la marĉo de Asaka, kantata en la poemaro Kokinsyuu, tamen neniu scias. Dum mi serĉadis la marĉon, demandadis, murmurante “Katumi, katumi”, jam suno subiras sur monteĝo. Ni turnis dekstren ekde la loko Nihonmatu, ekvidis la demonan rokan kavon en Kurozuka, tranoktis en la urbo Hukusima.

En sekva tago ni iris al la vilaĝo Sinobu por vidi ŝtonegon Sinobumozizuri [uzatan por tinkturado kaj ofte pritematan en poezio]. En la fora vilaĝeto sub monto estas la ŝtono enterigita duone. Knabo diris al ni: “Ĝi estis iam sur la monto, sed scivolemaj vojaĝantoj, preninte cerealon aŭ herbon, provadis ŝmiri sur ĝi, tial vilaĝanoj malamis tion, kaj faligis ĝin suben ĉi tien, tiam ĝi renversiĝis supere kaj sube”. Domaĝe, tio povis okazi.

Manoj, plantidon prikladantaj,  
Rememorigas min pasintecon,  
Kiam oni tinkturadis sur la ŝtono.

[Sanae toru temoto ya mukasi sinobu zuri]

Transiris ni la pramejon ĉe Tuginowa [laŭ rivero Aukuma] kaj alvenis al la etapa urbo Senoue. La vestiĝo de la provincestro Sato [Motoharu, patro de fratoj Tugunobu kaj Tadanobu, helpintaj al persekutita generalo Minamoto Yositone] troviĝas je ĉ. unu leŭgo kaj duono maldekstre sur la piedo de monto. Mi aŭdis, ke la nomo de la loko estas “Sabano” de la vilaĝeto Iidsuka, kaj iris, serĉadante, atingis la lokon, t. n. Maruyama [ronda monteto]. Ĝi estas la malnova domo de la provincestro. Mi ploris kun larmoj, kiam oni prezentadis ruinojn de ĉefa pordego kaj aliajn. En la apuda malnova templo restas la ŝtona monumento de la familio. Antaŭ ĉio kortuŝis signo de du edzinoj de fratoj. Miaj larmoj malsekigis manikon, ĉar ilia nomoj fariĝis famaj, kiel virinoj, fidele priservintaj al la edzoj. Ŝtona monumento, faliga laromojn, ekzistas [ne nur en Ĉinio] ankaŭ proksime. Enirinte la templon, mi petis teon, do montriĝas, ke ĉi tie estas konservataj la glavo de Yositone kaj la dorsosako de Benkei, kiel trezoro.

Kaj la dorsosakon, kaj la glavon  
En majo montrigu pompe,  
Kune kun papera flagrubando.

[Oi mo tati mo satuki ni kazare kami nobori]

Tio okazis la unan de majo. Ĉi nokte ni restis en la banloko Iizuka. Estas varma fonto,

do ni baniĝis kaj tranoktis tie, kie estas stranga mizera domaĉo kun pajlomato, sternata rekte sur terplanko. Sen kia ajn lanterno ni kuŝis sur lito, kiun ni mem pretigis ĉe la kameno kun fajreto. Kiam noktiĝis, subite tondris kaj pluvegis senĉese, pluvoakvo likadis sur nin, kuŝantajn sur la lito, krome pikate de puloj kaj moskitoj, ni ne dormis. Reaperis eĉ mia kronika malsano, mi apenaŭ ne svenis.

Fine lumiĝis ĉielo post la mallonga nokto kaj ni daŭre ekiris vojon. Malvigla mi estas pro la lasta nokto. Preninte ĉevalojn, ni veturis al la poŝtostacio Koori. La vojo restas ankoraŭ tre longa, tia malsano malcertigas min. Sed strebante pilgriman vojaĝon al malproksimaj landoj, penetrite de vanteco kaj preteco por forĵeti sin, liverante ĉion al la ĉiela ordono, ĉu mortos sur la vojo aŭ ne, do mi iomete revigliĝis kaj pli kuraĝe antaŭenpaŝis laŭ la vojo, kaj trairis la grandan fosaĵon, nomatan kiel la Granda palisaro de Date [kie armeo de generalo Sato estis venkita de Kamakura registaro].

Trapasinte tra mallarĝa vojeto, nomata Abumizuri [piedingoj frotiĝas], kaj preteririnte kastelon de Shiroishi [blanka ŝtono], ni eniris en la distrikto Kasashima [Pluvĉapela aŭ ombrela insulo], do demandis, kie troviĝas la tombo de Hujiwara Sanekata [poeto, mortinta apud la vojaĝdio Kasashima], oni respondis: “La montpieda vilaĝo, kiu estas videbla dekstre fore de ĉi tie, nomiĝas Minowa [Pluvomantela Rondo] Kasashima, ĝis nun ekzistas la sanktejo de vojodio kaj kreskas miskantoj kiel memoraĵo”. Vojo fariĝis aĉa pro lastatempa maja pluvo kaj krome mi laciĝis je korpo, tial ni preterpasis ĝin, nur vidante malproksime, tamen mi faris verson sekvan, ĉar mi venis ĉi tien, al Minowa Kasashima [pluvomantelo kaj ombrelo], ĝuste en la pluvsezono de majo.

Kasashima kie troviĝas?

En majo

Kota vojo

[Kasasima wa izuko satsuki no nukari michi]

Ni tranoktis en Iwanuma [Roka marĉo]

Okulfrapaj ŝajnas la pino en Takekuma. Je la tero el unu radiko dividiĝis du pinarboj. Montriĝas, ke ĝi ne perdis la tian formon, kia estis antaŭe. Antaŭ ĉio mi rememoris pri bonzpoeto Nooin [988- ?], kiu versis: “Nenia postsigno de la pino estas jam trovebla”, pro tio, ke iu guberniestro, enoficigita en la provinco Mutu, tranĉis ĉi tiujn pinojn kaj uzis ilin kiel fostoj por la ponto trans la rivero Natori. Mi aŭdis, ke de generacioj al generacioj oni aŭ tranĉadis aŭ plantadis ilin, tial do nun ili havas tiel bonordan jarmilan formon, kiel admirindaj pinarboj. Kyohaku, mia lernanto, iam sendis al mi la sekvan donacan verson je vojaĝo.

Pinarbojn en Takekuma  
montrigu al majstro,  
Ha, ĉerizo malfrua  
[Takekuma no matu mise mouse osozakura]

Al tio mi respondas per sekava verso,

Post la ĉerizo  
Ĝis la pino kun du arboj  
Pasis jam tri monatoj  
[Sakura yori matsu wa hutaki wo mitsuki koshi]

Transiris riveron Natori kaj eniris en la urbo Sendai. Tio estas en la tago por ornami per irido. Serĉis loĝejon kaj restis tie dum 4-5 tagoj. Ĉi tie loĝas unu pentristo, nomata Kaemon. Mi aŭdas, ke li estas klerulo, do konatiĝis kun li. Li ĉiĉeronis unu tagon, ĉar li diris, ke li longe esploras vidindejojn, ne konatajn poeziajn lokojn. Kreskas multe da arbustoj de lespedezo en la kampo Miyagino, do mi imagis autunan pejzaĝon. Nun tempas flori asebio[Pieris japonika] sur montetoj Tamada, Yokono kaj Tsutsujigaoka. Eniris en la pinarbaron, kien eĉ ne penetras lumo, nomatan Kinoshita [Sub arboj]. Tie multe rosas, kiel antaŭe, oni versis: “Diru al via sinjoro, lakeo, Ombrelon!” Adorvizitis templon Yakushi, sanktejon Tenjin, kaj tiu tago krepuskiĝis. La pentristo, i. a. donacis al mi skizojn de kelkaj lokoj en Matsushima, Shiogama, kiujn li desegnis. Kaj li donis al ni ĉe adiaŭo du parojn da pajlsandaloj kun malhelbluaj laĉoj[koloro de irido]. Li estas ja tia, fajna klerulo, aperigis sian veran esencon per tiu konduto.

Irido,  
Aligata al piedoj,  
Per laĉo de pajlsandaloj.  
[Ayame gusa asi ni musuban warazi no wo]

Laŭ la krokizita mapo ni iris vojetn al Fora provinco, kaj ĉe montpiedo kreskas karekso, fama ĉi-tiea produkto nomata Tohu-no-Suge. Mi aŭdas, eĉ nun ĉiujn jarojn oni tributas al guberniestro ensemblon el kareksaj matoj.

La ŝtona monumento “Tubo-no-Isibumi” Ĝi troviĝas ĉe la kastelo Taga en la vilaĝo

Itikawa.

La monumento havas altecon je 180 cm kaj larĝecon je 90 cm. Muskokovrite, literoj estas apenaŭ rimarkeblaj. Skribita estas distanco ĝis landlimoj de kvar direktoj. Kaj ankaŭ estas lapidarigitaj vortoj: “Ĉi tiu kastelo estas fondita de generalo Oono-no-ason-Azumabito, Inspektoro=komandoro de garnizono, en la unua jaro de Zinki [j.724]. Ĝin restaŭris kancelariano Emi-no-ason Asakari, generalo-gubernatoro de Orientaj maroj kaj montoj, 1-a tago de 12-a monato en la sesa jaro de Tenpyohooji [j.762]”.

Tio estis la epoko de Imperatoro Syoomu. Kvankam multe da poezioj transdiras de antikva tempo pri la historio, tamen montoj detruigadis, riveroj fluadis, vojoj ŝanĝiĝis, ŝtonoj enteriĝis kaj kaŝiĝis sub la tero, arboj maljuniĝis kaj anstataŭiĝis per arbidoj. Tempoj trapasis kaj preskaŭ ĉiuj ruinoj de lokoj fariĝis ne konataj, sed ĉi tie troviĝas la nedubebla atesto de miljaro kaj nun per siaj okuloj oni povas koni koron de antikvuloj. Tio estas graco por pilgrimado kaj ĝojo de vivo. Forgesante penigan vojaĝon, mi larmojn faligis.

Post tio mi vizitadis la lokojn ofte pritematajn en poezio, la riveron Noda-no Tamagawa, la ŝtonon Oki-no Isi. En Sue-no Matuyama [Pinmonto], la fama loko pro ampoezio, fondiĝis templo, nomata Matusyoozan. [unu poezio en Kokinsyuu kantas rilate al ĉi tiu loko: “Se mi perfidus vin, eĉ ondoj transfluus pinmonton Sue-no Matuyama”] Inter pinarboj troviĝas ĉie tombejoj. Al mi estas ege triste, ke tia fine devas esti la sorto de amrilatoj, kunĵurintaj eternan nedisigeblan parecon, kvazaŭ la birdoj kun nur unu paro da flugiloj aŭ du alligitaj branĉoj. Ĝuste tiam mi ekaŭdis vesperan sonorilon en la golfo de Siogama. Iomete sereniĝis ĉielo dum maja pluvo kaj videblas kaj svage vespera luno, kaj proksime insulo Magaki. Fiŝistoj remas boatojn, revenante hejmen, kaj laŭtvoĉe interdividas kaptajon. Mi komprenas signifon de la malnova poezio, kiu kantis “Kortuŝas ŝnuro, altiranta boaton remantan laŭ golfo de Siogama”, des pli emociata mi estas.

Ĉi-nokte blinda bonzo-menestrela ludis bivo-liuton kaj rakontante kantis baladon-ĵoruron de Oku provinco. Ĉi tio estas malsama de Heike monogatori, kaj ne estas danco. Li kantas kun rureska tono kaj iomete bruas ĉe oreloj, sed al mi ŝajnas ĝi tre laŭdinda, ne forlasante la tradicion de la provinco.

Frumatene ni adorvizitis la sanktejon Myoozin en la urbo Siogama. Granda feŭdestro, Date Masamune, rekonstruis ĝin, tial kolonoj estas dikaj, kolorigitaj ĉevronoj estas brilegaj, ŝtonaj ŝtuparoj estas alte metitaj unu sur aliaj, kaj matena suno briligas vermilionan sanktan barilon. Ĝis la fino de la vojo, ĝis la limo de la malpura lando

gardas nin ĉiam la sankta spirito, tiu kredo estas la moro de nia lando. Ha, kiel kara tio estas! Fronte de la sanktejo staras malnova lanterno. Sur la fera surfaso estas skribita: “En la 3-a jaro de Bunzi [1187] oferdonacis Izumi-no Saburoo”. Tio nun prezentas al mi ĝian bildon dum 500 jaroj, do ekstreme emocias min. Li estis la persono, brava, justama, fidela al la mastro kaj obeema al gepatroj. Ĝis nun oni ne devas ne respekti lian bonan nomon. Vere dirita estas: ”Oni devas fidele sekvi la vojon kaj gardi justecon, la fama nomo ankaŭ sekvas mem spontane tion”. Tago jam proksimiĝas al tagmezo. Pruntpreninte boaton, ni transveturis al la insuloj Matusima. Distanco estas du leŭgoj [ĉ. 8 km], ni atingis rifozaŭ bordon de la insulo Ozima[Vira insulo].

Nu, kvankam estas dirita multe pri Matusima, tamen ĝia pejzaĝo estas la plej bela en Japanio, kaj ne cedas al ĉinaj pejzaĝoj de lagoj Dotei[Dongting] kaj Seiko[Xihu]. El sudoriento sterniĝas maro, interne en 3 leŭgoj de golfo svarmas tajdo, kvazaŭ la rivero en la ĉina Sekkou [Zhejiang]. Kolektiĝas multaj diversaj insuloj, unuj altaj turnas sin al ĉielo, aliaj malaltaj kuŝas sur ondoj. Unuj insuloj troviĝas duoble surmetitaj, aliaj trioble, kaj disiĝitaj maldekstre, kunmetitaj dekstre. Unuj portas dorse aliajn, kaj brakumas en sia sino. Same, kiel oni karesas siajn infanojn kaj nepojn. Delikata estas verdo de pinarboj, kies branĉoj kaj folioj estas kurbigitaj per ventoj el maro, kvazaŭ la spontana arto de kurbiĝo. La pejzaĝo estas tiel alloga, kiel vizaĝo de belulino. Ŝainas, ke tion kreis la monta dio Ooyamazumi en mitologia pratempo de japanaj dioj. Kiu povus esprimi per penikoj kaj vortoj la arton de ĉiela inĝeniero?

Ozima estas insulo, ligita kun kontinento per ponto, etendiĝas en maro. Tie restas ruino de aparta kabano kaj roko por sidi, kie kontempladis Zenmajstro Ungo. Eĉ nun tie aŭ tie sub pinarboj troviĝas ermitoj, kiu loĝas trankvile en la ermitejo de herboj, kuirante malriĉan manĝaĵon de forĵetita rizo per fajro el pinkonusoj. Ne sciante, kio ili estas, sed allogate, mi alvenis al ili. Nokte pejzaĝo transformiĝas tre alia ol tage, la luno reflektata sur maro brilludas. Reveninte al la marbordo, ni trovis gastejon, kiu havas du etaĝojn kun fenestroj rigardantaj al la maro. Tie mi kuŝis aerumate en naturo, kai ĝuis mirindan, la plej misteran senton. Sora versis:

Ho, Matusima!

Ĉi tie en gruon

Metamorfiĝu kukolo!

[Matusima ya turu ni mi wo kare hototogisu]

Mi, ferminte buŝon, penadis ekdormi, sed ne povis dormi. Kiam mi disiĝis kun mia

lasta ermitejo, s-ro Sodo versis ĉine poezion pri Matusima kaj s-ro Hara Anteki ankaŭ donis al mi utaon [japanan poezion] pri la pinaj golfetaj insuletoj[Matugaurasima]. Ĉi-nokte, elpreninte ilin el tornistro, mi igis ilin akompanantaj amikoj. Kaj ĉe mi ankaŭ estas Hokku de s-roj Sanpu kaj Zyokusi, miaj lernantoj.

En 11-a tago de kvina monato [28 de Junio], vizitis templon Zuiganzi. Havas jam 32 generaciojn de ĉefbonzoj ĉi tiu templo, fondita de Makabe Heisiro, kiu, bonziĝinte, iris al Ĉinio kaj revenis hejmen. Poste dank' al virta penado de Zen-majstro Ungo estis rekonstruitaj sep haloj kun tegolitaj tegmentoj, kun oraj muroj kaj ornamoj, brilantaj de lumo, montriĝas la grandega templo por realigi paradizon de Budhao. Mi sopiras ankaŭ, pensante, kie do staris la templo de la sanktulo Kenbutu Hiziri [Budhaovidanto], profunde adorita de Saigyo.

En la 12-a tago [29 de Junio] mi celis urbon Hiraizumi. Mi aŭdis, ke survoje ekzistas la pinarboj en Aneha kaj la ponto de Odae, famaj en poezioj. Sed malofte iras homoj, ni devis iri ie ajn laŭ padoj por ĉasistoj, falĉistoj kaj hakistoj, finfine ni eraris vojon kaj atingis porton, nomatan Isinomaki. Videblas sur maro la monto Kinka [Ora floro], laŭdita iam en poezio de Ootomono Yakamoti "kie floras oraj floroj", kelkaj centoj da kargoboatoj amasiĝas en la golfo, sur la tero sternaĝas domoj kaj leviĝadas fumoj el la fornoj. Hazarde ni alvenis al la loko, kien ni ne planis. Kvankam ni volis lui ĉambron en gastejo, tamen neniu luigis ĝin. Apenaŭ ni povis tranokti en la mizera dometaĉo kaj frue en sekva mateno ekiris malcerte laŭ nekonata vojo. Ni iris laŭ la longa digo de la rivero Kitakami, preter pramejo de Sode, paŝtejo de Obuti, herbejo de fragmitoj de Mano, kaj aliaj famaj lokoj en poezio. Ni plu randiris maltrankvile laŭ la oblonga streta marĉo Naganuma kaj loĝis unu nokton en la loko, t. n., Toima. Fine ni atingis la urbon Hiraizumi. Al mi ŝajnas, ke ni trairis je ĉ. 20 kaj kelkaj leŭgoj.

La gloro dum tri generacioj lumis nur kvazaŭ en daŭro de unu dormo. La ruino de granda pordo staras je unu leŭgo antaŭ la kastelo. La domo de Hidehira tute malaperis kaj ŝanĝiĝis en kampon. Restas nur ruino de la monteto de ora koko Kinkeizan, konstruita en la formo de la monto Huzi. Mi supreniris al Takadati, al la ruino de la alta fortreso de Yositone, de kie videblas Kitakamigawa, la granda rivero, fluanta el norda provinco de Nambu. La flankrivero Koromogawa fluas ĉirkaŭ la kastelo Izumi kaj ĵetas sin en la granda rivero sub Takadati. La ruino de la kastelo de Yasuhira estas sur la alia bordo de Koromo Bariero. Tio, ŝaine, gardis enirejon de Nambu kontraŭ Ainuo. Elitaj fideluloj de Yositone kolektiĝis en ĉi tiu kastelo por sin lumigi en la lasta

momento, kaj ĉio ŝanĝiĝis en herbaron. “Ŝtato pereis, tamen restas montoj kaj riveroj; la ruino de kastelo estas en printempo amase kovrita de herboj kaj arboj”. Demetinte ĉapelon sur herbo, mi ploris kun larmoj tiom longe, kiom horoj pasis.

Somera herbo –

La sekvo de sonĝo

Por batalintoj

[Natu kusa ya    tuwamono domo ga    yume no ato]

En deŭziaj floroj

Videblas belaj haroj de Kanehusa,

Batalinta por Yositone

[Unohana ni    Kanehusa miyuru    siraga kana]    (Versita de Sora)

Du haloj, pri kiuj mi kun admiro aŭdis antaŭ longe, estas malfermitaj. En la Kyoodoo [halo de sutroj] restas statuoj de tri protektaj dioj, kaj en la Hikaridoo [luma halo] estas la ĉerkoj de tri generacioj [de Huziwara Kiyohira, Motohira, Hidehira] kaj tie ankaŭ estas instalitaj tri statuoj de Budhao. Jam perdiĝis sep trezoroj, rompiĝis per vento la pordo, iam inkrustita per juveloj, putris per prujno kaj neĝo la kolonoj, ore plakitaj. Tie jam frue defalus domoj, dense kreskus herboj, kaj regus vanto. Sed ĉirkaŭita per novaj muroj en ĉiu flanko, tegita per tegoloj kontraŭ vento kaj pluvo, ĝi portempe restas kiel la historia memoro.

Spite pluvon de majo

Restas ja bonsorte

La luma halo

[Samidare no    Huri nokosite ya    Hikari doo]

Ni nur vidis la foran nordan vojon al Nambu, preteririnte ĝin, ni tranoktis en la vilaĝo de Iwate. Ni strebas atingi la provincon Dewa, trairante la famaj en poezio lokoj, Ogurosaki, Mizunokozima, kaj poste irante de la varma fonto Narugo kaj ĝis la bariero Sitomae[Antaŭ Piso]. Laŭ ĉi tiu vojo malofte iras vojaĝantoj, tial la intendanto ege suspektis nin, kaj apenaŭ ni sukcesis trapasi la barieron. Kiam ni supreniris la grandan monton, jam krepuskiĝis, do ni petis loĝejon, vidinte domon de gardisto. Dum tri tagoj ventegis kaj pluvegis, tial do ni devis resti tie ĉi en la monto.

Puloj, pedikoj,  
Pisadas ĉevalo  
Ĉe kapkuseno

[Nomi sirami    uma no sito suru    makura moto]

La mastro de la domo diris, ke por trapasi plue ni petu gvidanton, ĉar pado ne estas certa de ĉi tie ĝis la Dewa provinco tra granda monto. Tial do ni serĉis homon. La fortikega junulo kun cimitaro kaj kverkobastono antaŭiras al ni. Timante, ke nun hodiaŭ ni nepre renkontus danĝeron, ni sekvas post li. Ĝuste laŭ mastro dense amasiĝas arboj en alta monto kaj aŭdiĝas neniŭ pepado de birdo. Sub arboj, ombroriĉe kreskantaj, mallumas, kvazaŭ ni irus nokte. Mi sentas, kvazaŭ terero falus ĉe rando de ombro, [kiel skribita de ĉina poeto Dufu], ni pezpaŝadas laŭ etbambua densejo fendante herbojn, travadis riveretojn, stumbladis sur ŝtonoj kaj tute ŝvitas malvarme, finfine atingis la vilaĝon de Mogami. Nia gvidinto diras: “Laŭ ĉi tiu pado nepre ĉiam okazas malutiloj, mi estas feliĉa, ke mi povis akompani vin sen iu ajn akcidento”. Ni disiĝis ĝoje. Eĉ aŭdinte tion poste, mi nur havas fortan korbato.

En la urbo Obanezawa mi vizitis unu haikiston, namatan Seihuu [Freŝa Vento]. Kvankam li etas riĉulo, tamen lia vivocelo ne estas malnobla. Li ofte iradas al ĉefurbo, kaj bone scias kompaton dum vojaĝo, tial do li, restigante nin ĉe si kelke da tagoj, konsolas nin post la longa vojaĝo kaj prizorgas multe per diversaj regaloj.

Refreŝo  
Estas mia loĝejo,  
Ripozas pace

[Suzusisa wo    waga yado ni site    nemaru nari]

Elrampu, bufo,  
De sub la silkraŭpejo  
Kie ci kvakas kaŝe

[Hai ide yo    Kaiya ga sita no    hiki no koe]

Broson por farbi brovojn  
Memorigas  
Floro de kartamo

[Mayu haki wo    omokage ni site    beni no hana]

Kulturistoj de silkraŭpo  
vestas sin  
Kiel antikvuloj  
[Kogai suru hito wa kodai no sugata kana] (Sora)

En la provinco de Yamagata troviĝas la monta templo, nomata Rissyaku-zi. Fondis ĝin granda majstro Zikaku [Ennin 794-864], kaj la loko estas aparte pura kaj kvietaj. Oni rekomendis al mi, ke indas vidi ĝin, do mi ŝanĝis vojon el Obanazawa, iris tien je 7 leŭgoj. Ankoraŭ ne krepuskiĝas. Ni luis antaŭe pilgriman loĝejon ĉe la piedo de monto kaj supreniris al la templo sur monto. Kun rokoj sur rokoj amasiĝas la monto, kun malnovaj pinoj kaj kverkoj, oldaj grundoj kaj ŝtonoj glate sternitaj per muskoj. Fermitaj estas la pordoj de ĉiuj adorejoj sur rokoj, kaj aŭdiĝas neniu bruo. Laŭirante krutegaĵon, rampante rokojn, adorante templon, ĉirkaŭate de bela pejzaĝo kaj kvieteco, mi eksentas min trankviliĝanta je koro.

Ho, kvieteco,  
Penetranta en rokojn  
Cikada trilo  
[Sizukasa ya iwa ni simi iru semi no koe]

Por ŝipveturi laŭ la rivero Mogami-gawa ni atendas ĉe la havenurbeto Ooisida bonan veteron. Ĉi tie semo de Haikai poezio falis teren jam antaŭ longe, do oni pene serĉas vojon de poezio, sopirante pasintecon de neforgeseblaj floroj, konsolante sin je koro per eŭfonio de ŝalmo kaj korno, kaj fine perdas direkton inter du vojoj, malnova kaj nova, ĉar estas neniu gvidanto, do mi kompletigis unu modestan skribrulaĵon de Renga [Haiku-ĉeno]. Tio estas la apogeo de ĉifoja estetiko.

La rivero Mogami-gawa havas sian fonton en Mitinoku kun sia supra fluo en Yamagata. Laŭ ĝi estas ankaŭ teruraj danĝeraj lokoj, kiel nomataj Goten [ŝtonoj de Go-ludo], Hayabusa [falko]. Ĝi fluas norde de la monto Itaziki-yama, kaj fine eniras en la maro ĉe Sakata. Montoj kovras dekstran kaj maldekstran bordojn, boato iras sub arbaĵoj. Ĉi tiun specon de boato ŝarĝita per rizo oni nomis, probable, “rizboato” [en antikva poezio]. Akvofalo, nomata Shiraito [Blanka fadeno], falas tra ĉiuj spacoj inter verdaj folioj, kaj sur la rando staras templo Sennindoo [Senmortulo], (prokultinta

Kaizon, subulon de Yositone). Boato iras dangere sur ŝvelanta akvo.

Gutojn de maja pluvego

Kolektante, rapidas

La rivero Mogami

[Samidare wo atumete hayasi mogami gawa]

En la 3-a de sesa monato [19 de julio] mi supreniras la monton Haguro [nigra plumo]. Mi vizitis mian skolanon-haikiston, s-ron Zusi Sakiti kaj ricevis aŭdiencon ĉe lia moŝto Egaku-Aĉarjo, la substituito de montestro. Li loĝigis min en la branĉa templo sur mezdekklivo Minamidani [Suda valo] kaj akceptis min kun delikata kompato.

La 4-an, en la ĉefa halo oni organizis kunsidon por Haiku.

Ho, miraklon benu,

neĝon bonodorigas

Minamidani, suda valo

[Arigataya yuki wo kaorasu Minamidani]

En la 5-a, mi adorvizitis templon Gongen. Oni ne scias, en kioma epoko vivis mastro Nouzyo-daishi, la fondinto de la templo. En la libro “Engisiki” tio estas notita kiel “Sanktejo de Usyuu-satoyama [Vilaĝa monto en provinco Pluma]”. Ideogramoj “Satoyama” kaj “nigro” estas similaj, do oni povus skribi erare? La nomo de Haguro [nigra plumo] povus deveni el mallongigo de “Nigra monto en provinco Plumo”? Toponimio de “Dewa”[oferi plumon], onidire, originas el enskribo en la antikva libro “Hudoki”: “oni oferas birdajn plumojn kiel tributaĵo el la provinco”.

La monto Haguro kune kun Gassan [luna monto], kaj Yudono [bana monto] konsistigas Dewa Sanzan [Triopajn montojn en Dewa]. Ĉi tiu templo apartenas al la ĉefa templo Edo Toeizan [Kan'eizi en Ueno], tenas la torĉon de la leĝo por subita luminiĝo per koncentrata meditado-introspekto kvazaŭ lumklara luno laŭ la instruo de Tendai Budhismo. Staras bonzloĝejoj en vicoj, tie helpas asketadon de ŝugendo [religia ekzercado por konkeri montojn], kaj oni kun humileco respektas miraklan efikon de sankta monto kaj sankta loko. Prosperu por ĉiam, verdire, admirinda monto.

En la 8-a tago [24 de Julio], ni supreniris la monton Gassan [luna monto]. Ĉirkaŭante kolon per kolieroj el ŝnuroj de noditaj brusetiaj paperoj, kovrante kapon per blanka

katuna krono, kondukate de forta gvidanto, nomata Gooriki, ni iris supren je 8 leŭgoj laŭ glacio kaj neĝo en la monta aero de nebuloj. Mi timis, kvazaŭ mi enirus en la nebula bariero de la vojo al la suno kaj la luno. Anhelante kaj frostiĝante, mi atingis la pinton, kiam subiris suno kaj aperis luno. Ni sternis etbambuojn kiel matracoj kaj igis bambuan trunkon kapkuŝeno. Enlitiĝinte, ni atendis elkrepuskiĝon. Kiam suno aperas kaj nebulo malaperis, ni iras suben al Yudono [bana monto].

Onidire, ĉe la valo staris forĝejo. En la provinco oni elektis sanktan akvon por forĝado, ĉi tie forĝistoj, puriginte sin, hardigis glavojn, gravuritajn per la nomo Gassan, kiuj estas laŭditaj tra la mondo. Venis al mi en la kapon malnova ĉina historio, en kiu estas skribita pri glavoforĝisto Ganjiang kun lia edzino Moye, ke li hardigadis glavojn per la Draka fonta akvo. Tio ĉi ja komprenigas min, ke ne estas malprofunda la spirito de fakuloj, la diligenta persisteco de lertuloj.

Dum mi sidiĝis sur la roko kaj iomete ripozis, troviĝis duone malfermantaj burĝonoj de ĉerizo alta je 3 futoj. Nur laŭdinda estas la koro de ĉerizo, kiu, kuŝante sub tavoligita neĝo, tamen ne forgesante printempon, ekfloras eĉ malfrue. Tio estas miraklo, kvazaŭ eĉ sub arda ĉielo bonodorus floroj de mirobalano[, kiel dirita en Zen-Budhismo]. Mi rememoris ĉi tie poezion de ĉefbonzo Gyouson [1055-1135], des pli forte mi sentiĝis tion. Ĝenerale estas malpermesita malkaŝi pri detaloj en la monto kiel morala leĝo de asketoj. Tial do mi pri tio ne skribos plue.

Reveninte al templa dormejo, mi skribis en kartonoj la poemojn de pilgrimo al Triopaj montoj laŭ la peto de Egaku-Aĉarjo.

Kiel freŝa estas,  
Sub pala lunarketo de tria tago,  
La monto Haguro  
[Suzusisa ya hono mikazuki no Haguro yama]

Kiom da nebulkrestoj  
Frakasiĝas,  
Ĉi-Monto de Luno  
[Kumono mine ikutu kuzurete tuki no yama]

Ne direbla estas  
La sperto en Yudono,  
Ho, malsekiĝis mia maniko  
Katararenu Yudono ni nurasu tamoto kana]

Sora versis:

La monton Yudono,

Tretante monerojn sur la vojo,

Oni iras kun larmoj

[Yudono yama zeni humu miti no namida kana]

Ni lasis Haguro, iris al Turugaoka en la kastela urbo. Nin akceptis samurai-oficialulo, nomata Nagayama Zyuukou, ĉe kiu en la domo okazis kunsido de Haikai. Komponiĝis unu skribrulaĵo da ĉeno de poemaro. Ĝis tiam Sakiti ankaŭ akompanis nin. Laŭ la rivero per barko ni veturis suben al la porto de urbo Sakata. Tie ni loĝis ĉe kuracisto, nomata En'an Hubyoku.

De la monto Atsumi-Varmafonto,

Ĝis marbordo Hukuura-Blovanta Golfo,

En la freŝa vento mi ripozas vespere

[Atumi yama ya Hukuura kakete yuusuzumi]

Varmegan tagon

Forportis en maron

La rivero Mogami

[Atuki hi wo umi ni ire tari Mogami gawa]

Traĝuinte belajn pejzaĝojn de maroj, montoj, riveroj kaj landoj, nun mi dediĉas mian atenton al pitoreska vidaĵo Kisagata. Nordoriente de la porto Sakata, trapasinte monton, irinte laŭ rifoza bordo kaj plaĝo, je distanco de ĉirkaŭ dek leŭgoj ni atingis tien, kiam suno iomete estis eksupreniranta. Vento el maro levas sablon, kaj la monto Chokai kaŝiĝis en nebulpluvo. En la mallumo aprezante, ke eĉ en pluvo estas mirinde, kaj esperante, ke estu pli bela ankaŭ serena vido post pluvo, ni enpremiĝis en fiŝistan kabaneton kaj atendis veteron. Sekvan matenon ĉielo bone sereniĝis, matena suno tiel pompe supreniras, ke ni ekveturas per boato laŭ golfo de Kisagata. Antaŭ ĉio ni direktis boaton al la insulo Nooin-poeto kaj vizitis ruinon de lia ermitejo dum tri jaroj, kaj poste surbordiĝis ankaŭ al alia bordo, kie restas kiel memoraĵo ankoraŭ la malnova ĉerizarbo en la poezio de Saigyō,

Ha, laguno de Kisagata,

Sur ondoj ŝvebas

Petaloj de ĉerizfloroj,  
Laŭ kiuj remas boaton fiŝisto

[Kisagata no sakura wa nami ni uzumorete hana no ue kogu ama no turibune]

Ĉe la bordo staras maŭzoleo, onidire, de imperiestrino Zinguu-kouguu. La nomo de templo estas Kanmanzyu. Mi ne aŭdis, ke ŝia Moŝto ĉi tien iam alvenis. Kiel do tio okazis? Sidante en la ĉefa ĉambro de la templo, malferminte rulkurtenon, oni povas vidi tutan panoramon per unu rigardo, sude la monto Chookai, subtenanta ĉielon, spegulas sin sur laguno. Okcidente estas la bariero Muyamuya, kiu limas vojon, kaj oriente estas konstruita digo kaj etendiĝas longe la vojo, kondukanta foren al Akita, norde kuŝas maro. La estuaro, kien ondoj eniradas, nomiĝas Siogosi. Vertikale kaj horizontale havanta ĉirkaŭ unu leŭgon, la laguno, kompare al Matsushima, estas je vidaĵo kaj simila kaj diferenca. Matusima kvazaŭ ridas, Kisagata kvazaŭ tristas. Ŝajnas al mi, ke, la teraspekto, aldonanta melankolion al tristeco, splenigas spiriton.

Ha, Kisagata,  
En pluvo floras mimozo,  
Tio memorigas tristan vizaĝon  
De bela, dormema ĉinino Xishi

[Kisagata ya ame ni Seisi ga nebu no hana]

En estuaro Siogosi  
Kruroj de grupoj malsekiĝas,  
Estas friske sur la maro

[Siogosi ya turu hagi nurete umi suzusi]

Pri la festo Sora versis:

Ha, Kisagata,  
Kian frandaĵon oni manĝu  
Ĉe dia festo?

[Kisagata ya ryoori nani kuu kami maturi]

S-ro Teizi, merkanto el la provinco Mino, versis:

Ho, fiŝista kabanaĉo,

Oni refreŝiĝas vespere,  
Sidante la pordopanelon  
[Ama no ya ya toita wo sikite yuusuzumi]

Vidante neston de pandionoj sur la roko en maro, Sora versis:

Gefiŝagloj nestas,  
Kio do ilin kunĵurigis,  
Ke ondoj ne ŝvelos?  
[Nami koenu tigiri ariteya misago no su]

Restado en Sakata daŭris tagojn pro malinklino forlasi ĝin, sed mi turnis min al nebuloj sur sekva vojo laŭ Hokuriku-doo. Ĉagrenigas por mi koron tiel lontana vojo, onidire, ke distanco ĝis la ĉefurbo de Kaga estas 130 leŭgoj. Trairinte la barieron de Nezu, piedirinte plu laŭ la lando de Etigo, ni atingis la barieron de Itiburi en la provinco de Etyuu. Dum ĉi tiuj 9 tagoj mi nenion skribis, ĉar min ĝenadis psike varmego kaj pluvo, kaj reaperis al mi malsano.

Rendevuo de Altairo kun Vego en sepa monato,  
Eĉ sesan nokton, antaŭvesperon de la festo,  
Ne ŝainas ordinale  
[Humizuki ya muika mo tune no yo niwa nizu]

Jen furioza maro,  
Al la insulo Sado kuŝas  
Ĉielrevera Galaksio  
[Araumi ya Sado ni yoko tau amanogawa]

Hodiaŭ transirinte plej malfacilajn lokojn en norda lando, nomatajn kiel Oyasirazu-Kosirazu [Loko, kie ne eblas zorgi eĉ pri gepatroj kaj gefiloj], Inumodori [Hundo retiriĝas], Komagaesi [Ĉevalo returniĝas], mi tre laciĝis kaj enlitiĝis kun kuŝeno, do tiam el la najbara ĉambro, fronta al vojo, aŭdeblas voĉo de du junulinoj kaj maljunulo. Mi aŭdas, ke ili flustradas, kaj mi scias, ke ili estas putinoj de Niigata en la provinco de Echigo. Ili iras al Ise por adorviziti la Sanktejon kaj li akompanis ilin ĝis ĉi tiu bariero. Morgaŭ ili skribos hejmen al sia vilaĝo leteron, portotan de li, por ke ili sendu vantan mesaĝon. Ili diras, ke, forlasintaj sin al bordo, kien blankaj ondoj iradas, ili falis mizere

en marfiŝista mondo kaj seksumadas nedefinite kun ĉiuj ajn kaj pekadas ĉiutage pro malbonsorta karmo. Aŭdante kaj reaŭdante ilian paroladon, mi dormis. Kiam ni estas ekveturontaj matene, ili turnas sin al ni kun peto: “Estas ĝene al ni sur nekonata vojo kaj tiel triste pro timo, ne sciante, kio okazus, ke ni volus iri post vi nerimarkate, kaŝe aŭ videble. Bonvolu kompati nin favore je viaj Budhistaj vestoj kaj kunligu nin kun vi laŭ Budhisma sorto”. Tiele ili diras, plorante. Kompatindaj ili ja estas, sed mi diris al ili: “Ni devos restadi en multaj lokoj laŭ la vojo. Al vi pli bone estos iri, sekvante tien, kien la aliaj iras. Nepre vin helpos Dio en bona vojaĝo”. Tiele mi fordiris, sed ekirante, mi ja dume ne ĉesis bedaŭri ilin.

En unu domo kune kun mi, bonzo,

Ankaŭ putinoj dormas.

Ja ĝuste flikitaĵo de lespedezo kaj luno

[Hitotu ya ni yuuzyo mo netari hagi to tuki]

Mi rakontis al Sora, kio okazis, kaj tion li surpaperigis.

Estas dirite, ke en la delto de rivero Kurobe disbranĉiĝas en 48 da torentoj. Ni travadis sennombrajn riveretojn, kaj alvenis al la kreko, nomata Nago. Mi volus vidi ondojn da visterio en la vilaĝo Tago, fama en la Man’jo poezio, pensante, ke, kvankam nun ne estas printempo, tamen eĉ en la komenco de aŭtuno ĝi havas propran specon de estetiko, kaj mi demandis iun pri ĉi tiu loko. Li respondis: “Necesas piediri de ĉi tie kvin leŭgojn laŭ rifoza marbordo kaj eniri malantaŭ tiun foran monton, sed ĝi troviĝas en la loko, kie estas nur povraj fiŝistaj domaĉetoj, tial do neniu luigos al vi ĉambron por unu tranokto”. Tiele oni timigis nin, kaj ni antaŭeniris rekte al la provinco Kaga.

Bonodoras fruaj rizoj,

Preteriras ni malĝlate,

Dekstre ondas rifriĉa maro

[Wase no ka ya wake iru migi wa arisoumi]

Ni trapasis lokojn, ligitajn kun la nomo de Genzi, Kiso Yosinaka, la monton Unohana kaj la valon Kurikara, kaj atingis la urbon Kanazawa en 15-a tago de sepa monato [30-a de aŭgusto]. Ĉi tie troviĝas hajkisto Kasyo, komercisto, venanta el Osaka. Ni loĝas kune kun li en lia kutima gastejo. Issyoo, la hajkisto, kies bonan reputacion je poezia vojo mi aŭdis sufiĉe, tial do li estis konata en la mondo, sed li mortis ankoraŭ juna en lasta

vintro. Lia pli maljuna frato okazigis kunsidon de hajku, kiel la ceremonio por la animo de mortinto, tiam mi versis:

Ho, ve, la tombo moviĝu,  
Mia voĉo de ploro  
Estas aŭtuna vento

[Tuka mo ugoke waga nakku koe wa aki no kaze]

Kiam oni invitis min en ies ermitejo, mi versis:

Estas malvarmete en aŭtuno,  
Bonvole ĉiu senseliĝu per siaj manoj  
Kiun ajn melonon aŭ melongenon,  
Kvankam ne naskiĝas la lasta el la unua.

[Aki suzusi te goto ni muke ya uri nasubi]

Mezvoja kanto

Spite, ke ruĝe brilas la suno,  
Kaj neeltenebla varmego,  
Sed jam aŭtuna vento

[Aka aka to hi wa turenaku mo aki no kaze]

En la loko, nomata Komatsu, kiu signifas malgranda pino

Modesta estas la nomo, Pineto,  
Vento tra arbaro ĝentile skuas  
Lespedezon kaj miskanton

[Siorasiki na ya Komatu huku hagi susuki]

Ĉi tie mi adorvizitis la Sanktejon Tada. Ĝi entenas helmon kaj brokaĵeron de Sanemori. Onidire, kiam li apartenis antaŭe al la Klano Genzi, sinjoro lordo Yositomo donacis al li ilin. Vere ili ne estas armiloj de ordinala soldato. Kaj okulŝirmilo kaj oreloklopoj estas gravulitaj per arabesko de krizantemo fare de oro, kaj al la kresto de drako sur la krono estas almetitaj kornoj de hoĵa formo. Post kiam Sanemori mortis en la batalo, generalo Kiso Yosinaka oferis relikvon kun sia peto por venko al ĉi tiu Sanktejo. Mi vidis, en la

kroniko estas skribita, ke Higuti Ziroo, vasalo de Yosinaka, portis ĝin ĉi tien.

Ho, kiel mizera!

Sub la helmeto

- Grilo

[Muzan yana kabuto no sita no kirigirisu]

Kiam ni piediras al la varma fonto en Yamanaka, malantaŭe videblas la monto Sirane. Maldekstre apud la montpiedo staras unu templo de Avalokiteŝvaro. Onidire, bonzo-eksmikado Kazan[968-1008], plenuminte pilgrimadon al 33 sanktaj lokoj laŭ Kinki provinco, instalis ĉi tie statuon de granda mizerikordo kaj nomis ĝin Nata. Li kunigis unuajn silabojn de du sanktaj lokoj: Nati, de kie komencis pilgrimo, kaj Tanigumi, kie finis pilgrimo. Aranĝitaj estas diversaj kuriozaj ŝtonoj, plantitaj malnovaj pinarboj. Malgranda herbotegita templeto estas konstruita sur la pinto de roko. Vere, tio estas laŭdinda loko.

Aŭtuna vento

Estas pli blanka

ol ŝtonoj de ŝtona monteto

[Isi yama no isi yori sirosi aki no kaze]

Mi baniĝis en la varma fonto. Oni diras, ke la efiko estas dua post Arima.

Ho, Yamanaka,

Ne bezonas pluki krizantemon,

Ŝvebas aromo el fonto

[Yamanaka ya kiku wa taoranu yu no nioi]

Mastro de banejo nomiĝas Kumenosuke, estas ankoraŭ knabo. Lia patro amas Haikai. Li estas konata en la mondo laŭ la epizodo. Juna Teisitu[1610-1673] iam el ĉefurbo alvenis ĉi tien kaj estis hontigita de li per estetika gusto, tial do reveninte al Kioto, disĉipliĝis ĉe Teitoku [1571-1653]. Eĉ post kiam Teisitu akiris famon, li ne akceptis monon por korekti verkojn de ĉi-tieaj vilaĝanoj. Tio jam nun estas epizodo de fora epoko.

Sora malsaniĝis je la ventro kaj li foriris al Nagasima en Ise provinco, ĉar tie li havas sian rilaton.

Irante kaj irante,  
se mi forfalus, kuŝus  
En kampo de lespedezfloroj  
[Iki iki te taore husu tomo hagi no hara]

Tiele li versis, lasante min. Malĝojo de foriranto kaj bedaŭro de forlasito faras nin kvazaŭ du vaneloj, disiĝantaj kaj ŝvebantaj en nebulo. Mi ankaŭ skribis verson.

Ekde hodiaŭ  
Akompanan ĵuron “Ni duopa” deviŝos  
De sur ombrelĉapelo rosoj  
[Kyou yori wa kakituke kesan kasa no tuyu]

Mi ekloĝas en la templo, nomata Zensyoozi, kiu staras en suburbo, ekstere de la kastelo Daisyoozi. Tio ankoraŭ estas ene de la tero Kaga. Sora ankaŭ tranoktis ĉi tie en la sama templo hieraŭ nokte, kaj postlasis sian verson.

Tutan nokton  
Aŭdeblis aŭtuna vento,  
Malantaŭe staras monteto  
[Yomosugara akikaze kiku ya ura no yama]

Diferenco nur pere de unu punkto, sed tio egalas al disiĝo je mil leŭgoj. Ankaŭ mi, aŭdante aŭtunan venton, kuŝis en la pensiono, kaj ĉirkaŭ aŭroro pure sonas recitado de sutroj, per bato de la sonora plato mi eniris en refektorion. Hodiaŭ mi iros al la provinco Etizen. Kiam mi rapide eliras el la templo, junaj bonzoj, portante paperon kaj inkon, kuras post min eĉ sub la peronon. Ĝuste tiam falas folietoj de plorsaliko en la korto. Spite tion, ke mi jam metis pajlajn vojaĝŝuojjn, antaŭ ĉio improvizite mi forskribas sekvan verson.

Almenaŭ mi volus balai korton  
Kaj poste ekirus,  
En templo falantaj salikfolioj  
[Niwa hakite idebaya tera ni tiru yanagi]

Apud la limo de procinco Etizen, ĉe la kreko Yosizaki mi veturis per boato al la pinarbaro Siogosi [Trans tajdo]. Iam Saigyo verkis.

Tutan nokton  
Per ventego alportataj estas ondoj,  
Luno pendiĝas  
super la Transtajda pinarboj

[Yomosugara arasi ni nami wo hakobasete tuki wo taretaru Siogosi no matu]

Per ĉi tiu poezio estas elĉerpita tuta pejzaĝo. Kiu aldonus unu vorton, tiu alfiksus kvazaŭ sesan fingron.

Mi vizitis abaton de Tenryuuzi templo en la urbo Matuoka, ĉar li estas mia malnova amiko. Ĝis ĉi tiu loko adorante vane akompanis min s-ro Hokusi el Kanazawa, kvankam li volus nur diri al mi adiaŭ. Li senprokraste sopiradis pri pejzaĝoj en diversaj lokoj laŭ la vojo, kaj kelkfoje esprimadis al mi interesajn poeziojn. Kaj nun jam mi skribas ĉe apartiĝo kun li.

Ventumilon,  
En kiu estas skribitaj poezioj  
Disŝiris ni por rememoro  
Pri la adiaŭo

[Mono kakite oogi hikisaku nagori kana]

Enirinte je ses kilometroj en monton, mi adorvzitis la Templon Eiheizi. Ĝi estas la templo de Zen-Majstro Doogen. Mi aŭdis ke estis la sankta celo en tio, kial li fondis templon fore de ĉef-urbo Kioto je mil leŭgoj en profunda monto.

Ĝis la urbo Hukui restis ankoraŭ 3 leŭgoj, do post vespera manĝaĵo mi ekiris sur vojon, kiun en krepusko mi sekvis ŝanceliĝante. Ĉi tie loĝas s-ro Tousai, malnova ermito. Iam li venis en la urbon Edo kaj vizitis min. Post tio pasis jam pli ol dek jaroj. Kiel li maljunuliĝaĉas aŭ jam mortis? Demandis mi al iu homo pri li. Do oni diris al mi, ke li ankoraŭ nun vivas en iu loko. Li loĝas nerimarkate en la urbo kaj mi trovis neordinaran dometon, kie rampas volviĝantaj lagenario kaj lufo, kaŝas pordeton celozio kaj

kenopodio. Konvikiĝinte, ke certe li loĝas en ĝi, mi frapis je la pordeto, tiam povra virino aperis, dirante: “De kie vi alvenis, s-ro migranta sanktulo? Mastro nun iris al iu malproksimen. Se vi bezonas, bonvole iru tien.”

Videble ŝi devas esti lia edzino. Tia sceno troviĝas nur en malnova klasika literaturo. Baldaŭ ni renkontiĝis kun li, kaj mi loĝis ĉe li en la dometo du noktojn. Poste mi ekiris en la vojon al la porto de Tsuruga por vidi tie la plenan lunon. Tousai ankaŭ volas min akompani, ĝojplene gvidas vojon, refaldinte baskon de kimono komike.

Kaŝiĝis la monto Siranegadake pli kaj pli, kaj aperis la monto Hinagadake. Transirinte la ponton Asamuzu, ni alvenis al Tamae, kie spikiĝis kanoj. Ni trapasis la barieron de Uguisunoseki kaj transiris montokolon Yunootooge, kaj alvenis al la kastelo Hiutigazyoo [iam aparteninta al Kiso Yosinaka]. Mi aŭdis krion de unuaj sovaĝanseroj de aŭtuno apud la monto Kaeruyama. En la krepusko de 14-a tago [27-a de septembro] ni trovis gastejon en Turuga ĉe la haveno.

Tiun nokton luno estas aparte hela. Mi diris: “Morgaŭa nokto ankaŭ estu tia!” Oni respondis: „Kiel kutime en ĉi provinco Kosizi, ne estas certe ĉu fariĝos serena aŭ ne la sekva nokto”. Tion dirante, gastejestro donis al ni trinki sakeon. Nokte ni adorvizitis sanktejon Myozin de Kei. Ĝi estas maŭzoleo de imperiestro Tyuuai. La fasado de la sanktejo aspektas dia, tra pinarboj filtras lunlumo, kaj antaŭa blanka sablaro ŝainas kvazaŭ kovrita per prujno. Antaŭlonge la dua migranta ĉefbonzo de la Budhisma sekto Zisyuu ekvotis grandan voton, ke li mem falĉadis herbon, alportadis teron kaj ŝtonojn, kaj elsekigis ŝlimejon, do malaperis ĝeno por iri al adorvizitado. Ĝis nun tiu tradicio ne ĉesis, kaj oni alportas puran sablon antaŭ la altaro. Tio nomiĝas “sabloportado de migrantaj sanktuloj”. Tiele parolis gastejestro.

Pura estas luno

Sur la sablo

Alportita de migranto

[Tuki kiyosi yugyou no moteru suna no ue]

En 15-a tago pluvos ne spite vorton de gastejestro.

Ve, plenluno,

Vetero en norda lando

Estas tre ŝanĝiĝema

[Meigetū ya hokkoku biyori sadame naki]

En 16-a tago sereniĝis ĉielo, do mi ankaŭ, samkiel Saigyo, ekvolis preni ruĝajn konkuletojn de “Masuho” kaj al la plaĝo de Ironohama mi veturis per ŝipo. Navigis laŭ la maro je 7 leŭgoj. Iu sinjoro, nomata Ten’ya, preparis zorgeme portmanĝaĵojn kaj bambuajn tubojn da vino, enŝipigis multajn siajn servistojn. Kun vento al pobo ni tuj atingis celon. Sur plaĝo staras malmulte da dometoj de fiŝistoj kaj troviĝas mizera templo de Budhisma sekto Hokke. Ĉi tie ni trinkis teon kaj varmigitan sakeon. En la vesperkrepusko estis tiel solece, ke mi ege sentis min kortuŝita.

Multe pli soleca

Ol en Suma

Estas aŭtuno sur tiu ĉi plaĝo

[Sabisisa ya Suma ni katitaru hama no aki]

Inter ondoj miksiĝante

Kune kun konkuletoj,

Flosas florpecetoj de lespedezo

[Nami no ma ya kogai ni maziru hagi no tiri]

Pri skizo de tiu tago mi lasis al Tosai skribi kaj restigis ĝin en la templo.

Rotsuu venis renkonte al mi ĝis la haveno kaj akompanis min al la provinco Mino. Kun helpo de ĉevalo mi eniris en la urbon Oogaki, tiam Sora ankaŭ alvenis el Ise kaj Etsuzin venis, rajdante sur ĉevalo, kaj ĉiuj kolektiĝis ĉe Zyokou en lia domo. Vizitadis min tage kaj nokte s-roj Zensensi, Keikou kun lia filo, kaj aliaj intimuloj, jen ili ĝojegas kaj vartas min, kvazaŭ ili renkontus reviviĝinton. Antaŭ ol mia revigliĝo el laciga vojaĝo, jam en la 6-a tago de 9-a monato [18-a de oktobro] mi ekveturis per ŝipo por vidi la ceremonion de la transmeto de diaĵo en Ise.

Kiel meretriko

Disiĝas en du partoj,

Adiaŭante, mi iras nun al Hutami,

Pasas aŭtuno

[Hamaguri no hutami ni wakare iku aki zo]